

Usona Esperantisto № 2023:4 (jul-aŭg)

Anoncoj

Rezultoj de la ĉi-jara balotado; E-USA ricevas fonojn por Esperanto-eventoj; ESF duobligas donacojn al EUSA; Stipendioj haveblas por partopreni kongresojn; Paralela Universo revenas; Rafa NOGUERAS gajnas en INK-konkurso; Nova kanalo de EUSA en Telegram; Zoom-kunveno kun Chuck SMITH kaj Judith MEYER; Zoom-prelego pri Pasporta Servo

De la estraro

Dumonataj raportoj de la Direktoroj kaj aliaj estraranoj.

Raporto de la Landa Kongreso

kongresaj raportoj • Mathias TYSON

La Usona Landa Kongreso de 2023, kiu okazis en Ralio, Norda Karolino ĉe la universitato William Peace, estis la unua ĉeesta Esperanta aranĝo, kiun mi partoprenis.

Bimonthly expense report

de la centra oficejo • Vilĉjo HARRIS

Expense report from the CO for June and July.

President's Report - August 2023

de la prezidanto • Brandon SOWERS

It has been about one month since the end of our Landa Kongreso, and the addition of several new members to our Board.

Morojo, la praavino de rolkostumado

esperantistoj de Losanĝeleso • Brandon SOWERS

Morojo (alinome Myrtle R. DOUGLAS) bedaŭrinde estas pli bone konata ekster nia movado ol ene.

Fiaskilo

senintenca esperantaĵo • Brandon SOWERS

Okaze de tio, se vi bezonas helpon fiaski.

Kiel engluti manĝon sen maĉi zorgoplenajn pensojn?

traduku! • Hoss FIROOZANIA

Ĉi-numere ni konsideras tradukojn de fragmento el *La domenisto* de Paulo Sérgio VIANA.

La vivo de Peĉjo

ŝercoj • Timothy BORONCZYK

La dudek-oka en serio de Timothy BORONCZYK.

Mikronoveloj

Novaj centvortaĵoj.

All about -um

language corner • Lee MILLER

The suffix *-um* broadens or gives a different meaning to the root.



Amanda HIGLEY-SCHMIDT aŭskultas prelegon ĉe la Landa Kongreso en Raleigh. Foto de Alekso MILLER.

Anoncoj

Rezultoj de la ĉi-jara balotado

Dankon al ĉiuj membroj, kiuj voĉdonis en la balotado por la estraro. Jen la rezultoj, kalkulitaj fine de la Landa Kongreso en Ralio:



- El niaj 424 membroj, voĉdonis 191 (43%).
- Prezidanto: gajnis Brandon SOWERS per 181 voĉoj.
- Vicprezidanto: gajnis Hoss FIROOZNA per 182 voĉoj.
- Direktoroj: gajnis
 - Quintyn BOBB per 135 voĉoj kaj
 - Enrique Haro MÁRQUEZ per 104 voĉoj.
- La proponitaj amendoj (§1301 – §1304) sukcesis, kun 169 voĉoj por, 18 kontraŭ, kaj 4 sindetenoj.

Kaj jen la ĝisdatigita **listo de ĉiuj estraranoj**

<<https://esperanto-usa.org/eusa/board/>>:

Posteno	Deĵoranto	Ĝis
Prezidanto	Brandon Sowers	2026
Vicprezidanto	Hoss Firooznia	2026
Sekretario	Charlotte Burton	2025
Kasisto	David Beck	2024
Direktoro	Quintyn Bobb	2026
Direktoro	Timothy Boronczyk	2024
Direktoro	Ruth Keess-Cohen (Margo)	2025
Direktoro	Enrique Haro Marquez	2026
Direktoro	Fred Meyer, III	2025
Direktoro	Jane Shevtsov	2024

Bonvenon al niaj novaj estraranoj!

E-USA ricevas fonojn por Esperanto-eventoj

Esperanto-USA dankas al Andy BLAIR kaj la Kanada Esperanto-Asocio, kiuj desegnis kaj donacis al nia organizo tri belajn, grandegajn fonojn pri NASK, la

Landa Kongreso, ESF, kaj La Usona Bona Film-Festivalo.

Post la originala uzo de la kadroj por la Universala Kongreso en Montrealo, KEA donis tiujn fonojn (kun skatoloj da kongresaj notlibroj kaj sakoj) al Aleksio MILLER, kiu pakis kaj portis ilin aŭte al Usono. Andy prezentis kelkajn ideojn al la estraro de Esperanto-USA pri novaj tolaj kovriloj por la kadroj. Li mendis ilin (sen ajna kosto al ni) de fabrikejo en Ĉinujo kaj sendis ilin al Karlo MAYS en Norda Karolino. Preskaŭ ĉiu partoprenanto ĉe NASK kaj la LK profitis per fotoj antaŭ tiuj fonoj, kaj ili donis profesionan aspekton al la eventoj kaj al nia organizo. Aleksio planas uzi la kovrilojn pri la film-festivalo por Holivud-eska premiero en Atlanta, Georgio dum la nuna Usona Bona Film-Festivalo.

— Aleksio MILLER



La ĉeesta NASK-teamo pozas antaŭ unu el la fonoj.

ESF matches donations to E-USA

The Esperantic Studies Foundation (ESF) has agreed to extend its matching program for donations to E-USA through 2023, up to a total of \$5000 for the year.



When you donate to E-USA through ESF, your donation will be matched dollar for dollar. The matching funds are intended to be used to provide direct benefit to E-USA members and in the past have been crucial to the success of the Usona Bona Film-Festivalo and to production of the film version of the new play *1910* that was performed onstage at the UK in Montreal in August 2022. Please donate to help us continue to fund Esperanto activities and programs in the United States.

Donate today! <https://www.paypal.com/donate/?hosted_button_id=7PDRAZGYEG9E>

Stipendioj por kongresoj

Esperanto-USA volas doni stipendiojn kaj helpon por partopreni kongresojn ĉi-jare. Ĉu vi volas partopreni

kongreson, sed ne certas, ĉu vi povos – aŭ pro monaj kialoj aŭ pro la manko de ia alia helpo? Kontaktu nin per la subaj formularoj:



- **Internacia Junulara Kongreso**

<<https://forms.gle/sfUiHy6MB6WDXzh29>> (IJK – Lignano Sabbiadoro, Italujo)

- **Tut-Amerika Kongreso de Esperanto**

<<https://forms.gle/a7jqhU3gqXdaNqvn7>> (TAKE – Fortalezo-CE, Brazilo)

Paralela Universo: la 19-a de Aŭgusto

Ĉu vi jam konas Paralelan Universon? Estas tradicio, ke dum certa tago, Esperanto-kluboj ĉirkaŭ la mondo faros eventojn samtempe, tiel, ke espereble preskaŭ ĉiuj, kiuj volas partopreni Esperanto-aranĝon povos fari tiutage.



Ĉi-jare Paralela Universo

okazos la 19-an de Aŭgusto, ĉeeste por la unua fojo post la komenco de Kovimo! Kaj Esperanto-USA volas aparte kuraĝigi kaj instigi la okazigon de multaj eventoj tra Usono.

Pro tio, ni disponas pri financa subteno por grupoj, kiuj aranĝos eventojn. La unuaj dek grupoj kiuj anoncos siajn eventojn al ni rajtos poste peti re-pagon de ĝis 50 USD. Tio povas esti por kafo, por manĝaĵo ĉe pikniko, por biletoj ĉe muzeo, ne gravas. Ni krome helpos disanonci la eventojn anoncitajn.

Estas nur kelkaj kondiĉoj:

- La evento devas esti afiŝita en la **PU-retejo** <<https://paralelauniverso.com>> kaj oni devas anonci ĝin al eusa@esperanto-usa.org antaŭ ol la 10-a de Aŭgusto.
- Ĝi devos okazi la 19-an de Aŭgusto, en Usono.
- Vi devos poste sendi fotojn, kiuj montras la partoprenon de almenaŭ kvar personoj, kun klaraj esperantaĵoj (flagoj, glumarkoj, libroj).
- Vi devos sendi vian kvitancon al

eusa@esperanto-usa.org antaŭ la 26-a de Aŭgusto.

Jen kelkaj sugestoj, kiuj povos igi vian eventon eĉ pli interesa:

1. Anoncu la eventon en diversaj sociretaj paĝoj! Eble vin surprizos, kiom da homoj interesiĝos aŭ aperos.
2. Anoncu al lokaj gazetoj, kiuj eble interesiĝos.
3. Aranĝu disponi materialon pri Esperanto por interesatoj, kiuj venas al la aranĝo.
4. Sugestu ke ĉiu portu Esperanto-libron por interŝanĝi. Portu kelkajn kromajn (se vi havas) okaze ke iuj ankoraŭ ne havas Esperanto-librojn.

Faru ankaŭ foton de la partoprenantoj kun siaj interŝanĝitaj libroj.

Por pli da informo kaj sugestoj por eventoj de Paralela Universo, bonvole vizitu la **PU-retejon**

<<https://paralelauniverso.com>>.

— *Brandon SOWERS*

INK-konkurso

Hieraŭ anonciĝis rezultoj de la dua Interkultura Novelo-Konkurso (INK) dum la UK en Torino. Por la dua jaro sinsekve, la unuan premion gajnis nia membro Rafa NOGUERAS. La konkurso ricevis centojn da proponoj en Esperanto kaj ankaŭ en la ukraina, rusa, kaj itala. La premiita verko de Rafa, *La babaŝa preĝkolĉeno*, estas **rete aŭskultebla en YouTube** <<https://youtu.be/ctAvyDoQrpQ>>.



E-USA en Telegram

EUSA dissendas ĉiujn siajn anoncojn tra pluraj sociaj komunikiloj, inkluzive de Facebook, Reddit, kaj Mastodon.

Ĉar esperantistoj foje aktivigas



ankaŭ en la tujmesaĝilo **Telegram**

<<https://telegram.org>>, ni ĵus aldonis kanalon ankaŭ tie. Ĝi ricevos la tutsamajn informojn, kiujn ni jam aŭfiŝas aliloke, do povos trafi ĉion ene de nur Telegram.

Vizitu nian kanalon ĉe https://t.me/eusa_anoncoj <https://t.me/eusa_anoncoj>. Eblas ankaŭ aldoni komentojn tie.

Special Interest Groups

You may have seen Esperanto-USA's directory of local groups, which bring together speakers from different geographical regions. But did you know we also maintain a **database of special-interest groups** <https://esperanto-usa.org/groups/special_interest_groups/>?

Each "SIG" is devoted to a particular topic. Currently, we have groups that focus on games (e.g. chess, role-playing), hobbies (e.g. ham radio), and lifestyles (e.g. veganism). What's more, SIGs don't have to maintain the same sort of strict neutrality that Esperanto-USA is sworn to, so they can be devoted to political or religious topics.

Check out the database and see if there's something that interests you. We also welcome the creation of new SIGs. If you'd like to start one, please register your new group with the form on **our main groups page** <<https://ttt.esperanto-usa.org/groups/>>.

SIGs sometimes provide updates about upcoming events with a blog, a mailing list, or some other means of sending out messages to interested parties. Links to these (if the SIG has them) can be found in the respective group listings.

Zoom-kunveno kun Chuck SMITH kaj Judith MEYER

Se vi lernis Esperanton per Duolingo ... Se vi aĉetis, aŭ eĉ konsideras aĉeti, *Complete Esperanto* ... Se vi ŝatas

Polyglot Gatherings ... Se maŝintradukiloj interesas vin... Se vi iam uzis Vikipedion ...

Pro tiuj kialoj, kaj pro multaj aliaj kialoj, nepre partoprenu nian Zoom-kunvenon je sabato la 23-a de Septembro.

Bonvolu viziti la **jenan**

paĝon en EventaServo <<https://eventaservo.org/Ameriko/Usono/Saint%20Louis>>; alklaku "Mi interesiĝas!" kaj vi ricevos memorigon! (Cetere, ni ŝatus scii kiom da homoj ĉeestos ĝin – pli/malpli.) Kiel vi vidos en EventaServo, nia Zoom-ligilo haveblas je nia **paĝo pri eventoj** <<https://esperanto-stl.weebly.com/events.html>> kaj la kunveno komenciĝos je 14:00 meze de Usono. Tiu horo estos 15:00 en Novjorkio, kaj 12:00 en Kalifornio.

Konatiĝu kun du gastoj kiuj faris kaj faras multon por Esperantujo. Cetere, bonvolu inviti samideanojn de ĉiuj landoj.

— Peggy DOLTER

Zoom-prelego pri Pasporta Servo

Saluton! Bv partopreni Zoom-kunvenon je sabato, la 21-a de Oktobro. Niaj gastoj prelegos pri Pasporta Servo, unu el la plej allogaj aferoj pri Esperantujo. **Jen la detaloj.**

<<https://esperanto-stl.weebly.com/events.html>>

Hello! Please participate in a Zoom meeting on Saturday, October 21. Our guests will speak about Pasporta Servo, one of the most attractive features of the Esperanto world. **Here are the details** <<https://esperanto-stl.weebly.com/events.html>>.

— Peggy DOLTER



foto de Daniel Schwen, **CC-BY** <<https://creativecommons.org/licenses/by/3.0/deed.eu>>



foto de Daniel Schwen, **CC-BY** <<https://creativecommons.org/licenses/by/3.0/deed.eu>>

De la estraro

Is it time to rethink the *Landa Kongreso*?

Hoss is Vice President of E-USA. Contact him at <hoss@lodestone.org>.

(*Esperanto-traduko haveblas en la reta bulteno.*)

Should we consider more environmentally-friendly alternatives to our national congress?

July 2023 was not only the hottest month in recorded history; it was the hottest for our planet in over 10,000 years. Global temperatures reached roughly 1.5°C above preindustrial averages, a level that is forecast to become the “new normal” by the end of the decade.



The results were calamitous. Here in North America, residents of the southern U.S. endured temperatures above 100°F for weeks, and wildfires raged out of control across the continent. In the northeast, where I live, we saw phenomena unknown in recent memory: for days, smoke from Canadian wildfires darkened the skies, making outdoors activities hazardous, and a “thousand year” flood ravaged portions of Vermont and New York.

According to climatologists, average yearly CO₂ emissions will soon need to fall below two tons per person in order to avoid an even more catastrophic warming of 2°C. But average emissions remain around four tons per person worldwide, and here in the U.S., it's more like *sixteen* tons per person. One of the largest sources of that CO₂ is transportation, and jets are especially wasteful: even a relatively short flight—from New York to Raleigh and back, for example—can emit between a quarter to half a ton of CO₂ per passenger.

I'm not suggesting that we stop traveling, of course. But to avoid creating an even hotter future, we'll need to cut out our less important trips—especially if they involve long-distance travel for only a short stay at the destination.

Congresses of the past

Esperantujo has a long history of annual congresses. It's a tradition born of necessity: when Esperanto-USA (then ELNA) was founded in the early 1950s, the in-person congress was one of the few practical means available for board members to communicate as a group in real time. In those days the congress had essential administrative and legislative functions. It could also be a relatively long affair, sometimes lasting for up to five days.

Today, the *Landa Kongreso* has become a weekend event held more for amusement than for administration. We do have board meetings at the congress, but they're largely redundant, because we already hold regular meetings online.

So we're faced with a difficult question: how can we responsibly ask our members to fly thousands of miles across the country each year for such a short event, especially when its administrative functions are largely obsolete? Can we somehow retain the social aspect of an in-person event without the long-distance travel?

Multiple regional events

An alternative can be found in the regional Esperanto gatherings that occur throughout the year, often without any support from Esperanto-USA. Among the largest and best known are TKEK (in California), NOREK (in the northwest), ARE (in the northeast), and PER (mid-Atlantic). Most recently we've also seen the rise of *Paralela Universo* <<https://paralelauniverso.com>>, a series of short, informal get-togethers arranged online.

Rather than staging the annual congress in its currently monolithic, expensive form, what if Esperanto-USA were to instead devote its resources to assisting with regional gatherings throughout the year? Regional events are within reach of more people, require less travel expense, and can be held at a time of year when the local weather is most suitable.

Multiple mini-NASKs, too

Making the idea of regional gatherings even more attractive, we recently had a proposition from the Esperantic Studies Foundation (ESF, sponsor of NASK). They noted that the summer institute presents a travel dilemma as well; in particular, it attracts more participants when held alongside the LK, such that people can attend both events with just a single trip.

Therefore, to make NASK easier to attend for a wider audience, ESF is considering splitting it into a series of separate courses held at regional gatherings throughout the year. And because NASK has now ventured into online courses, it can also offer virtual instruction before each regional event, thereby extending and enriching participants' time in "Esperantujo."

Plans for a traditional *Kongreso* are already underway for 2024, but what about the following year? Should we consider partnering with multiple regional events throughout 2025 instead of holding a single LK in one location? We'd especially like to hear from you if you're involved in organizing a regional event. (Or if you're interested in doing so!)

— Hoss FIROOZANIA, *Vicprezidanto*

Board Meetings at the LK, June 8–9th, 2023

Unua kunsido

Estraro Cxeesta: Filipino DORCAS, Alekso MILLER, David BECK, Charlotte BURTON, Fred MEYER III, Margo KEVESS-COHEN

Membraro Cxeesta

22 homoj (inkluzive estraranoj)

La prezidanto bonvenas nin kaj dankas al la rezolucia komitato (Margo kaj David). La rezolucia komitato skribas la oficialajn dankojn, honoran membrecon, ktp. Jarraportoj estas haveblaj nun, kun informo pri la agadoj de E-USA kaj siaj komitatoj kaj financaj raportoj pri la antaŭa jaro. La prezidanto parolas pri la plibonigo de la organizajxo dum pasintaj jaroj, inkluzive finance. Poste, li resumas la jarraporton, kaj eksplikas la rilaton inter E-USA kaj ESF. Ni sxangxu kelkajn malgrandajn erarojn, kaj klarigi, ke "Stipendioj kaj Premioj" ne rilatas al la film-festivalo, kaj ke la monon por la 1910 projekto ne kostis al E-USA. Kun tiuj sxangxo, Brandono proponas, ke ni akceptu la Jarraporton, kaj Fred subtenas. La membraro unuanime

akceptas.

Davido klarikas, ke ni priparolu financajn aferojn angle, kaj, ke la bugxeto temas pri cxiu-tagaj kostoj. The budget relates to overhead costs for the organization. Rachel asks about the bookstore, and David clarifies that we still do sell some books, and we pay some rent for Bill using a room of his house for storing books to sell. Currently, we ship many books from UEA, but UEA is considering discontinuing its book service, so discussion arises as to how Esperanto-USA should consider changing our book service. Margo and one other mention that Hanso kaj Licxjo currently are working on a book service out of the USA, and Brandon mentions the library that the Canadian Esperanto Association runs for its members. The topic of membership dues arises, and Fred clarifies that the Membership Committee is discussing this. Alex mentions that, if the issue with Amazon is the uncertainty of which books are good, then we can curate a list of which Amazon items for Esperanto are high quality. Moving back to the budget, David clarifies that the Cost of non-inventory sales should be about 10% less than the non-inventory sales. Fred moves to make that edit, and Brandon seconds. Unanimously approved. Chuck Mays moves to accept the budget. Rachel Helps seconds. Unanimously approved.

Filipo petas voluntulojn por niaj komitatoj. Edukada komitato estas gvidata per Margo kaj temas pri kiel Esperanto-USA subtenu Esperanto-edukadon. Ekzemple per skribado de artikolojn por Usona Esperantisto pri lingvaj temoj. Tiuj cxi artikoloj uzas la klarigojn de Licxjo MILLER pri Esperanto. Pro la laboro de Margo kun tiu komitato, E-USA pagis la kostojn por la KER-atestilojn de Euxropo por la ekzamenintoj dum la pasinta jaro. Nun ili pripensas kion fari pri kursoj por usonanoj, kiel la Londona Klubo havas.



Dua kunsido

Cxeestas: Filipino DORCAS, Alekso MILLER, David BECK, Charlotte BURTON, Margo KEVESS-COHEN, Fred MEYER III

26 homoj enetute

Ni spektas filmeton, per kiu Duncan CHARTERS salutas la kongreson nome de UEA kaj petas, ke homoj aligxu al UEA kaj parolas pri etekilo kaj la venonta Universala Kongreso.

Filipo anoncas la rezultojn de la balotado, ke Brandono SOWERS estos prezidanto, Hoss FIROOZANIA estos vicprezidanto, kaj la novaj estraranoj estos Quintyn BOBB kaj Enrique HARO. La kongreso dankas al la aliaj kandidatoj: Charles GERMANY kaj Logan HALL.

Pri la loko de la venontjara LK, la opcioj estas: Los-Angeleso, CA, Koro de Aleno, ID, kaj Springfield, MA. El tiuj tri nur Los-Angeleso havas lokan grupon. Rafa proponas, ke ni akceptu la proponon de Los-Angeleso. Margo subtenas. Charlotte diras al la aliaj du grupoj, ke ili

rajtas partopreni la LKK-n por Los-Angxelesan Kongreson, kaj Chuck MAYS diras, ke la cxi-jara LKK ankaux helpu al la novan klubon. Davido klarigas, ke la Los-Angxelesan klubon ne havas unu lokon por gxi, sed havas kelkajn ideojn. La kongreso voĉdonas, kaj la propono estas unuanime aprobata.

Fred parolas pri la grandaj laboroj de Filipino DORCAS por Esperantujo en Usono, kaj la estraro kaj kongreso honoras lin per trofeo kiel dankon por liaj 12 jaroj kiel prezidanto kaj liaj jardekoj da servo al E-USA.

Board Meeting, July 15th, 2023

Ĉeestas: Brandono SOWERS, David BECK, Charlotte BURTON, Margo KEVESS-COHEN, Fred MEYER III, Quintyn BOBB, Enriko HARO, Jane SHEVTSOV; sen voĉdonrajtoj: Vilĉjo HARRIS

Per custom from the previous president, Brandon states he will guide the board meeting in English. A quorum is declared. The meeting is called to order. Per board procedure, the minutes of the previous meeting are automatically approved.

Standing Reports

Central Office

Nothing to report, as Bill is trying to catch up on post-Congress requests.

President's Report

The president prepared the agenda for this meeting.

Treasurer's Report

Nothing to report since the LK

Old Business

Technology

We were going to look into getting some technology subscriptions. Bill got the one currently in use through TechSoup, though there is some question of how many Zoom accounts we will need. Per discussion in Raleigh, we were going to see how much use we can get out of the current Zoom account before getting more. Further, the board will discuss in Slack how to proceed on an upgraded Slack account.

New Business

Parallel Universe

Brandon proposes supporting local groups at up to \$50 each for the first ten local groups to request it, to support them in participating in Parallel Universe. The full proposal is listed in Appendix B. Jane raises the question of whether \$50 would be enough to actually support any local group

activity, or whether we should subsidize some larger amount with individually approved amounts. Margo moves that we vote on Brandon's proposal. Jane recommends we may want to set up a rubric to help determine what proposals we can support. Charlotte suggests that she and Jane can plan to support bigger proposals for Zamenhof Day. Brandon calls for the vote, which passes unanimously.

US Representation at UK

Booth at Movada Foiro

Brandon proposes collaboration with Charlotte and Bill to gather materials to display and distribute at our booth at the movada foiro. With a budget of up to \$100. Charlotte and Bill agree. Rafa and Kuo will be at the UK, as well as David, and may be able to work at our booth at the movada foiro. Brandon proposes we amend the amount to \$300, and Margo seconds. With no opposition, the amendment passes unanimously. The vote passes unanimously. **Action Item: Bill and Charlotte will collaborate to gather materials to display at UK with a budget of up to \$300.**

Telegram-Grupo

Brandon proposes that we create a Telegram group called Usonanoj ĉe UK 2023, and begin letting people know about this. **Action Item: Brandon will create a Telegram group, then hand it over to Q.** This passes unanimously.

Komitato de UEA

So far, Duncan Charters has been acting as our committee representative for UEA. While Duncan has been president, he has been our committee member, but per our bylaws, we should select a different person each year. Brandon suggests we have two people sit in on each of these meetings during the UK when possible. There is uncertainty as to whether there are similar meetings needed outside of the UK. David proposes we accept this proposal to determine whether we can have a second person sit in on the committee meetings. Margo seconds. Unanimously in favor. **Action Item: Brandon will investigate the matter of komitatanoj for UEA.**

Committees

Regarding the new committees we are setting up (Diversity Committee, Project Committee, Communication Committee), Brandon suggests we follow the model of the Nomination Committee in order to ensure effective committees. Tim Boronsky has been leading the Membership Committee. The Nomination Committee and Membership committee meet every 1-3 months and communicate some in between. New committees (including the Diversity Committee, the Project Committee, and the Communication Committee) should be on hold until we select chairs for each committee, a description of the committee's purpose, and then a final make-up of the

committee. The President is empowered to take point on this, but consult with the board prior to any decisions. Jane suggests an amendment wherein the final make-up of the committee will be at the discretion of the selected chair, in consultation with the President, and a list brought to the board, including bios, for final confirmation. After the committee is initially formed, all future decisions are up to the committee, in consultation with the president. The board agrees that committee chairs can be, but need not be board members. David proposes we vote on the amended proposal. Margo seconds. Jane abstains from the vote, and all others vote in favor.

Board Functioning

Margo, Kuo, Fred, Brandon, and Hoss agree to be in a small committee to help draft working rules and guidelines

regarding board functioning. Margo proposes we approve this move. David seconds. The proposal passes unanimously.

Communication Strategy

Quintyn has been thinking about our communication strategy and will be offering the board some materials to help us determine our communication strategy as an organization moving forward.

Next Meeting

August 12, 1 PM Eastern. Passes by acclamation. Meeting adjourned 2:06 EST.

Appendices: Tagordo, Paralela Universo

Raporto de la Landa Kongreso

kongresaj raportoj • Mathias TYSON



La Usona Landa Kongreso de 2023, kiu okazis en Ralio, Norda Karolino ĉe la universitato William Peace, estis la unua ĉeesta Esperanta aranĝo, kiun mi partoprenis.

Post alveno al la kongresejo, mi iris al la registrejo por ricevi la ŝlosilon de mia ĉambro, ŝlosilkarton (por malfermi pordojn de la diversaj konstruaĵoj), kaj programon por la kongreso. La unua tago de la kongreso estis ankaŭ la lasta tago de NASK. Klasoj por NASK finiĝis, kaj poste okazis tagmanĝo. Mi estis tre malsata post longega flugo; do estis bone, ke mi alvenis precize kiam tagmanĝo komenciĝis. Okazis la diplomiĝo de la NASK-anoj, kaj du el miaj bonaj amikoj ricevis siajn diplomojn pri partopreno en la kursaro. Tuj post la diplomiĝo okazis la ferma ceremonio. Okazis ankaŭ improvizaĵo, en kiu unu el miaj karaj amikoj rolis. Post la spektaklo okazis viva epizodo de la podkasto *Usona Personoj* kun Brandono, Rafa kaj Hanso. Post la podkasto, la gufujo – aŭ tio, kion oni nomis gufujo – malfermiĝis, kaj mi ludis la tabulludon *Settlers of Catan* kun nova amikino, kiu instruis al mi kiel ludi ĝin. Ni ludis ĝis iom post noktomezo.

Mia sekva tago kompreneble komenciĝis kun matenmanĝo je 7:15, sed aliaj komencis la tagon pli frue, farante tajĝiĉuanon subĉiele. Post la tagmanĝo okazis la solena malfermo de la kongreso. Murray MERNER prelegis pri nia komunumo kaj pri la historio de la usona movado. Post la malferma ceremonio okazis la ĉefa prelego de Kuo kun la nomo *Pri komunumo sen limoj*. Mi aŭskultis atente. Temis pri la kulturo de Esperanto, la akceptemo kaj celoj de la

esperanta komunumo. Ĝi akceptas ĉiajn homojn de ĉiu lando, etna grupo, lingvo, politiko, ktp. Kvankam mi ne precize memoras la vortojn de la prelego, ĝia inspira sento restas kun mi. Post la prelego okazis grupfoto de ĉiuj partoprenantoj en la salono.

Poste okazis samtempe la unua aferkunsido (kiun mi ĉeestis), kaj kunsido pri koniĝo (kiun mi ne ĉeestis). Post tiuj eventoj, ĉiuj tagmanĝis, kaj ni havis liberan tempon de la 12-a ĝis la 14-a. Post tagmanĝo okazis tri aferoj samtempe: *E-USA (Esperanto-USA): kulturaj agadoj* gvidita de Brandono SOWERS, kiun mi partoprenis, kaj du sesioj pri lerniloj kun Katalin KOVÁTS – kaj la libroservo. Dum la kunsido pri kulturaj agadoj mi kontribuis al la diskuto. Tio surprizis min, sed mi sentis min tiom komforta en Esperantujo, ke mi spertis nenian nervozecon. La sekvaj du samtempaj kunsidoj estis *E-USA: Estonteco*, gvidita de Brandono, kaj la libroservo, kiu daŭris ĝis la 16-a. En la E-USA-kunsido mi kontribuis kelkajn ideojn. Post tiuj kunsidoj, je la kvina, komenciĝis *Lernu mikronoveli*, gvidita de Rafa NOGUERAS; dum tiu sesio ĉiu skribis mallongan frazon sur papero kaj transdonis tion al aliulo, kiu faris same ĝis estis dek frazoj de tiom da homoj, sed unu mallonga kaj freneza rakonto.

Je 17:30 komenciĝis tagmanĝo, kaj sekve okazis libera tempo. Mi vagis tra la tereno de la kongresejo, parolante jen kaj jen kun samideanoj, ĝis estis tempo por speciala evento, malferma al la publiko: Kontradanco! Mi tre ĝuis la dancadon. Ĝi estis tre bona maniero konatiĝi kun aliaj, kaj lerni proprasperte pri kiel esperantistoj interagis realvive. Mi tre ĝojas, ke mi partoprenis. Post la dancado mi kaj kelkaj aliaj iris al la gufujo, kaj denove ni ludis tabulludon kaj babiladis ĝis malfruhore.

La tria tago komenciĝis same kiel la dua. Tajĝiĉuano, sed en tio mi ne partoprenis. Post matenmanĝo okazis la laborsesio pri kanto-tradukado, gvidita de Gary BISAGA, kiun mi partoprenis. En tiu sesio la principoj de tradukado estis diskutitaj, kaj traduko de *Margaritaville* estis ludata, kaj ĉiuj kunkantis. Samtempe okazis sesio de la Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto (AAIE) kiun gvidis Bill

HARRIS.

Post tio okazis surtablaj rolludoj de la 10-a ĝis la 11-a, kiun prezentis Roberto KINGSLEY. Li prezentis esperantajn tradukojn de rolludoj similaj al *Dungeons and Dragons* (Karceroj kaj Drakoj), kaj faktojn pri tiaj ludoj kaj kiel ludi. Poste ĉeestantoj ludis ludon, kiun Roberto tradukis, nomatan *Labirinto kaj Levjatanoj*, Temas pri pli simpla vario de Karceroj kaj Drakoj. Mi tre amuziĝis, kaj mi ŝatus denove partopreni tian ludon kun esperantistoj en la estonteco. Samtempe kiel la rolludado, okazis la dua aferkunsido de la 10-a ĝis la 11-a, kaj *E-USA: Kial Aniĝi?* Ankaŭ gvidita de Brandono de la 11-a ĝis la 12-a. De la 12-a ĝis la 13-a posttagmeze okazis tagmanĝo kaj libera tempo ĝis la 14-a. Dum la libertempo, mi denove vagis tra la tereno de la kongresejo, kaj parolis longe kun amikino pri ĉio kaj nenio.

De la 14-a ĝis la 15-a okazis laborsesio pri *Kiel propogandi Esperanton* kaj prelego *Sciencfikciaj verkistoj/Holivudo*, prezentita de Brandono, kiu faris multan esploradon por povi prezenti tion. La prelego temis pri sciencfikciaj verkistoj de la fruaj jaroj de la ĝenro, kiuj estis esperantistoj. Unu el tiuj homoj estis virino konata en la movado kiel Morojo, kiu ankaŭ estis la fondinto de rolkostumado. Foje estas surprize, ke iuj esperantistoj estis tiom grave influaj rilate al kulturo kaj historio.

De la 15-a ĝis la 16-a okazis samtempe tri aferoj. La dua kaj lasta tago de la libroservo, kiu daŭris ĝis la 16:30, *Ni Ludu Muzikon!*, Kaj *E-USA: retaj edukado kaj eventoj*, kiun mi partoprenis. En tiu sesio mi ne nur ĉeestis sed bone kontribuis. Tio min surprizis iomete, sed mi sentis min tiom komforta kaj tiom parto de Esperantujo, ke mi ne eĉ nervoziĝis. Mi iris al la libroservo poste, kaj aĉetis kelkajn Esperantajn librojn kaj pinglojn.

De la 16-a ĝis la 17-a okazis sesioj *Libroj, kiujn ni rekomendas*, kaj *Origamio-Laborsesio*. Mi partoprenis la librorikomendadon. Mi rekomendis la librojn *Ideoj Ĝermas* de Steven BREWER kaj *Sed nur fragmento* de Trevor STEELE. De 17:30 ĝis 18:30 estis vespermanĝo, sekvata de duonhora libertempo. De la 20-a ĝis la 21-a okazis unu evento, *Distra vespero*. Dum tio, pluraj homoj volonte montris siajn talentojn pri kantado, muzikumado; kaj gasto de Nepalo, Indu DEVA, montris tradician dancon de sia lando. Mi

poste iris al drinkejo, kie mi esperantumis kun novaj amikoj, kaj mi finis la vesperon en la gufujo.

La kvara tago, la 10-a de Julio estis la lasta tago de la kongreso, kiel la antaŭaj tagoj de la 7-a ĝis 7:30 okazis tajĝiĉuano antaŭ la manĝejo kaj matenmanĝo de 7:15. Mi babilis iom kun miaj novaj amikoj kaj dum la libera tempo mi envalizigis miajn aferojn pretiĝante por mia flugo hejmen. De la 9-a ĝis la 10-a okazis sesio pri la estonteco de la Usona Esperantista Junularo (USEJ). Post tio okazis du samtempaj sesioj: *Kunsido de la Regionaj Kunordigantoj de E-USA* kaj la *Laborkunsido pri Bakado*, en kiu la partoprenantoj ne bakis, sed faris simplan ĉokoladaĵon.

Poste okazis la *Solena fermo* de la kongreso de la 11-a ĝis la 12-a. En tiu sesio okazis resumo de iuj pri la kunsidoj kaj sesioj, bondeziroj al kelkaj esperantistoj kiuj ne ĉeestis, kaj ĉe la fino, ĉiuj kantis *La esperon*. Dum mi kantis, vibretis mia haŭto pro la misteraj sonoj, kiujn priskribis Zamenhof en sia parolo ĉe la unua Universala Kongreso:

... tra la aero de nia salono flugas misteraj sonoj, sonoj tre mallaŭtaj, ne aŭdeblaj por la orelo, sed senteblaj por ĉiu animo sentema: ĝi estas la sono de io granda, kio nun naskiĝas. Tra la aero flugas misteraj fantomoj; la okuloj ilin ne vidas, sed la animo ilin sentas; ili estas imagoj de tempo estonta, de tempo tute nova. La fantomoj flugos en la mondon, korpigiĝos kaj potenciĝos, kaj niaj filoj kaj nepoj ilin vidos, ilin sentos kaj ĝuos.

Okazis poste tagmanĝo de la 12-a ĝis la 14-a, kaj poste venis tempo por foriri. Mi longe ĝisis kaj multe brakumis miajn amikojn, kaj eĉ ĝise kisis mian karan amikinson. Tiu ĉi resumo ne kaptas la emociojn, kiujn mi sentis dum la kongreso, kaj kiel mi eĉ pli nun ol antaŭe sentas min kiel parton de unu granda rondo familia.



Mathias TYSON

Mathias ("Maĥiac Korako") komencis lerni Esperanton en 2016, kaj pere de Esperanto li trovis amon por poezio kaj literaturo. Li loĝas en Globe, Arizono.

<mathias1tyson@gmail.com>

Bimonthly expense report

de la centra oficejo • Vilĉjo HARRIS

Please note: no expense data for June was reported. Please direct any questions to the Central Office.

For brevity, only expenditures of \$10 or greater are listed. Contact the Director of the CO at info@esperanto-usa.org if you have suggestions for making future reports more informative. Please note that expenses from our **Restricted Funds** <<https://bit.ly/3lzL1LK>> are **not** determined by the CO, and all questions regarding these funds should be directed to their respective managers.

DATE	PAYEE	AMOUNT	ACCOUNT	MEMO
2023-07-02	ENDICIA	147	Bulteno - Print & Post	2023:2
2023-07-11	RAND PRINTING	237	Bulteno - Print & Post	2023:2
2023-07-12	Federal & State Payroll Taxes	186	Payroll Tax Expense	Employer taxes
2023-07-12	Federal & State Payroll Taxes	695	Salaries	Employee taxes
2023-07-12	HARRISWB	1736	Salaries	payroll
2023-07-14	ADP	62	Payroll Fees	fees
2023-07-14	ENDICIA	20	Catalog Service Postage	monthly charge
2023-07-16	UEA-V	3000	UEA konto	al ELNA-konto elna-w - 2654.60 EUR
2023-07-19	Mays, Charles	581	E-USA Convention Expenses	fakturo por elspezoj dum a landa kongreso 2023
2023-07-26	Beck, David J.	800	Gen Fund Expenses	Reimbursement for congress expenses
2023-07-30	Miller, Alex	115	Goldman Fund Expenses	Food during Film Festival launch
2023-07-30	Miller, Alex	272	Gen Fund Expenses	Stipend for congress
2023-07-31	ENDICIA	70	Catalog Service Postage	4 stamp rolls
2023-07-31	ESF-V	5200	NASKE Fund Expenses	Stipends for NASK 2023
2023-07-31	GRUBB & ELLIS MGMT. SERV	238	777 Fund Expenses	Esperanto Office- Desk Space C-D4
2023-07-31	PAYPAL	84	Credit Card Expenses	Fees

Kolofono

Redaktoro/Editor: Hoss FIROOZANIA

Kontaktu nin ĉe <bulteno@esperanto-usa.org> aŭ:

Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
500 Joseph C. Wilson Blvd.
CMC Box 274195
Rochester NY 14627-4195
United States of America

Usona Esperantisto estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla lingvo. Artikoloj estu proksimume 500–1500 vortojn longaj. Prefere sendu materialojn retpoŝte kun viaj nomo, adreso kaj memfoto. Kun aliaj fotoj bonvolu sendi informon pri datoj, lokoj, kaj nomoj de la foti(n)toj. Ni resendos poŝte ricevitajn materialojn se vi aldonas mem-adresitan, afrankitan koverton.

Opinioj esprimitaj en *Usona Esperantisto* apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre prezentas vidpunktojn de la redaktoro aŭ Esperanto-USA.

Materialoj aperintaj en *Usona Esperantisto* estas libere haveblaj kaj redisdoneblaj laŭ la permesilo CC BY-SA 4.0. Ni tamen petas, ke legantoj atendu du monatojn antaŭ ol reeldoni la plej freŝajn artikolojn.

Kontribuontoj bonvolu legi la kalendaron de limdatoj kaj redakciajn konvenciojn en la reta kolofono. Sendante materialon al la redakcio, oni donas al Esperanto-USA neekskluzivan permeson redakti kaj aperigi la materialon laŭ la supra permesilo.

Aŭtoroj tamen retenas kopirajton kaj tial rajtas reuzi, reeldoni, aŭ vendi siajn originalajn, neredaktitajn verkojn laŭplaĉe, sen bezono atribui ilin al *Usona Esperantisto*.



Usona Esperantisto (“American Esperantist”) is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA. We welcome contributions in both Esperanto and English; preferred length for an article is 500–1500 words. Please send materials by email if possible and include your name, address, and a portrait photo. With other photos please include the name of the photographer and subject(s), location, and date. We’ll return materials sent by postal mail if you include a self-addressed, stamped envelope.

Opinions expressed in *Usona Esperantisto* are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or Esperanto-USA.

Materials appearing in *Usona Esperantisto* are made freely available and redistributable under the Creative Commons license CC BY-SA 4.0. As a courtesy, however, we ask readers to wait two months before republishing the latest content.

Contributors should consult the deadline calendar and style guide in the online colophon. By sending materials to *Usona Esperantisto*, you grant to Esperanto-USA nonexclusive rights to edit and publish the materials under the above license. Authors however retain copyright for their works and thus may reuse, republish, or sell the unedited originals as they wish, without any need for attribution to *Usona Esperantisto*.

President's Report - August 2023

de la prezidanto • Brandon SOWERS

Editor's note: Summaries of this article are available on YouTube in **Esperanto** <<https://youtu.be/ez9yW5QmsA8>> and **English** <<https://youtu.be/f84WJ1c4-54>>.



Rafa Nogueras and Carter Williams at our booth during the Movada Foiro, Universala Kongreso 2023, Torino, Italy.

Saluton!

It has been about one month since the end of our Landa Kongreso, and the addition of several new members to our Board. Between the end of our Landa Kongreso, the Universala Kongreso in Turin, and an unexpected financial windfall, it's been an action-packed and exciting month!

This is my first report as President of the Board - I will try to summarize the Board's activity over the past month, to keep everybody as informed as possible.

Raleigh

An informal meeting of the board members who were in Raleigh gave a great start to the new year. We took this opportunity to get to know each other and share our priorities for the year to come. I shared a copy of **Robert's Rules in Brief**

<<https://robertsrules.com/books/newly-revised-3rd-in-brief-edition/>> with each board member who was there to make sure we are on the same page about meeting procedure, and what to expect from different roles. (This short booklet is packed full of useful and easy-to-read suggestions!)

We also named the Nominations Committee for the coming year, composed of Amanda Schmidt (chair), Vince Allison, Mara Rockliff, Rachel Helps, and Carter Williams. I'm very excited about this mix of people: they have different levels of experience in the movement, some have been on this committee in the past while others have not, they are diverse with regard to gender and age, and all of them bring important qualities which will contribute towards a very strong Nominations Committee this year. This is particularly important this year as Bill Harris, our General Director, has let us know that after many years of service, he would like to be able to retire soon and to make sure we have time to find a good replacement. This year's committee already has a good plan to assist with searching for interested candidates for a new director, and to ultimately make a recommendation to the board.

There were a lot of young people present in Raleigh. We encouraged them to meet together and discuss what they could do with the help of Esperanto-USA. They've already put together a **Discord** <<https://discord.gg/5B7n8bJkn>> for younger American Esperantists. Some of them even went to the Internacia Junulara Kongreso in Italy!

First Board Meeting

We held our first official board meeting approximately one week after the end of the Landa Kongreso in Raleigh. As there were a lot of upcoming things related to the Universala Kongreso (which just took place in Turin, Italy), it was a packed meeting. We decided on many things which I'll report in more detail about below.

Universala Kongreso

We had a good number of Americans in attendance at the Universala Kongreso which just finished in Turin (about twenty), including two board members. We wanted to make sure that our participation there was noticeable and impressive to the international movement. We also wanted to share exciting updates for those who were not able to attend.

We arranged a booth at the Movada Foiro, and then made sure it was well staffed and stocked. Carter Williams and Rafa Nogueras took charge of it, and we had a variety of materials showing the output of American Esperantists: books donated by Myrtis Smith and Aaron Fingtam (as well as some sent by the Central Office), stickers for Usona Persone, fliers for the Usona Bona Film-Festivalo, and a poster designed by Carrie Jones with QR codes for all of these, as well as the YouTube and Twitch pages for Alex Miller, Catie Neilson, and Alena Adler. Thanks to Carter, Rafa, Myrtis, Aaron, and Carrie!

We also created a telegram group for Americans who were going to the Universala Kongreso to make sure they were able to be in touch with each other and coordinate while there, which got a lot of use. We've encouraged them to collaborate on writing up a report for the Bulletin.

The Board also wanted to have some more American Esperantists present at the UEA committee meetings, to make sure that the board and the organization have more exposure to these. Quintyn Bobb, one of the new Board members elected in Raleigh, sat in on some of these meetings.

Two literary festivals announced their results in Turin, and American Esperantists were well represented. Rafa Nogueras won first place in both the Interkultura Novelo-Konkurso as well as the prose category of the Belartaj Konkursoj. The Belartaj Konkursoj awarded four prizes in total to three American participants, which appears to be a record for us! (The other winners were Debra Hamel, 2nd place in Mikronovelo, and myself, honorable mention in Eseo; Rafa also picked up an honorable mention in Prozo.) We made sure that we had announcements to celebrate this, in our bulletin, **Facebook feed** <<https://www.facebook.com/esperantousa/>>, and **Instagram** <<https://www.instagram.com/p/CvkSSut0oUx/>> (about which more below).

Paralela Universo

August 19 is **Paralela Universo** <<http://paralelauniverso.com>>, a day when Esperanto groups around the world are encouraged to plan in-person events. The Board decided that this year we would give additional encouragement to local

groups in the US to plan an event, by offering to reimburse them for up to \$50 for their event.

With Alex Miller's help, we made **two** <<https://www.youtube.com/watch?v=TU45gl2VlH0>> **announcement films** <<https://www.youtube.com/watch?v=3U5pnmi738k&t=4s>> for this which were shared widely and have been seen several hundred times, in addition to an announcement in the bulletin.

At the time of writing (August 11), ten events have been announced in the US. For comparison, only four other events have been announced so far in the rest of the world. Hopefully we'll see even more in the next few days!

Committees

At our meeting in July, the Board decided to form three new committees this year: Projects, Communication, and Diversity.

The Board agreed that in order to start these committees off strong, that I should pick chairs for each of these committees and then work with those chairs to pick the rest of the committee members. I'm happy to announce that Projects (chaired by Logan Hall) and Communications (chaired by Quintyn) have already been approved by the board. We'll be working on forming the Diversity Committee over the coming month.

Slack and Google for Nonprofits

The Board has been using the free version of Slack for its communications since 2017. Approximately two years ago Slack began limiting free Slack instances to only see the most recent 90 days of messages. The Board discussed applying for a free Slack for Nonprofits account to upgrade this, and with the increased activity on our Slack now was a good to do the upgrade. We applied and were approved, so we have now unlocked our full Slack archives as well as other premium features.

We also noticed that we should be eligible for Google for Nonprofits, which would give us access to Google Workspaces, premium Youtube features, and grants for advertising. We have applied for this and are

waiting to hear back.

Media and engagement

The Board has been starting to experiment with areas of social media where we have not ventured until now. Enrique Haro Marquez, another one of the new Board members, has started **an Instagram account** <<https://www.instagram.com/esperanto.usa/>> for us. Our first post was an announcement about the four awards won by three Americans in the Belartaj Konkursoj, which has had a lot of engagement already.

Additionally, Hoss Firooznia, our new Vice President, has started a **Telegram channel** <https://t.me/eusa_anoncoj> through which we can share announcements, and which has a discussion group tied to it. This gives us another channel for engagement with members and supporters.

Lastly, at the end of July, the Washington Post published **an article about Esperanto literature in English translation** <<https://www.washingtonpost.com/books/2023/07/28/esperanto-literature-eroshenko-fenikso/>>. This article quoted Hoss extensively, mentioning the online translation course he gave through NASK earlier this year, as well as the Fenikso project which he has been leading, through which Esperanto-USA aims to republish Esperanto classics and make them once again available.

Finances

This might be where most people's eyes usually glaze over, but this month has some very exciting developments. In addition to two generous donations

from members, and some matching that will happen from the Esperantic Studies Foundation's **Esperanto in the USA program**

<<https://www.esperantic.org/en/donate-to-the-esperanto-in-the-usa-fund-matched-by-esf/>>, we received notice that Esperanto-USA will be receiving a generous bequest from the estate of a long-time member, Robert Swenson and his late wife Ann.

David Beck, our treasurer, was at the Universala Kongreso when the Board received this information, but has still been able to make sure that we are on the ball here. We will be having a meeting of our Financial Committee as soon as possible to discuss the best way to receive these funds and what to do with them after they are received. We will likely also bring in an outside financial advisor to make sure that we have a solid foundation, and to give advice going forward.

Conclusion

It has been an exciting month for the Board, and we have gotten a lot done! We also got a lot of "foundational" work done this month, which puts in a very good position to continue doing great things in the coming months.

We hope that the next report will be as exciting as this one!



Brandon SOWERS

Brandon is President of Esperanto-USA.

<bsowers@protonmail.com>

Morojo, la praavino de rolkostumado

esperantistoj de Losanĝeleso • Brandon SOWERS

Tiu ĉi nova rubriko mallonge traktos rimarkindajn esperantistojn en la historio de Losanĝeleso, anticipi al la venonta Landa Kongreso, kiu okazos en tiu urbo.

Kiu estis Morojo?

Por la unua fojo en la historio de NASK (aŭ la Landa Kongreso de E-USA), en 2023 unu el la salonoj prenis la nomon “Morojo”. Sed kiu estis Morojo? Kaj kial ni havis salonon nomitan por tiu persono?

Morojo – alinome Myrtle R. DOUGLAS – bedaŭrinde estas pli bone konata ekster nia movado ol ene. Ŝi ekaktivis en la Esperanto-movado en Usono dum la 30-aj jaroj, kaj samtempe en la frua sciencfikcia kulturo. Kun kelkaj aliaj esperantistoj-sciencfikciuloj, ŝi partoprenis la 1-an Mondan Kongreson de Sciencfikcio, kadre de la Monda Foiro de Novjorko de 1939, kie ŝi kreis kaj debutis la unuan fantazian kongresan vestaĵon. En 2016 la internacia ligo de kostumistoj rekonis ŝin kiel “La Patrino de Kongresa Kostumado”. Alivorte, ŝi estas la praavino de rolkostumado!¹ Tamen ĝis nun neniu rimarkis, ke



samtempe kaj samloke okazis usona kongreso de Esperanto, kaj Morojo ankaŭ tie debutis sian fruan kostumfaradon!

Morojo estis ankaŭ tre aktiva en la fruaj “fangazetoj”.² Ŝia ĉefa fangazeto nomiĝis *Guteto*. Ĝi ĉiam citis strofojn de la zamenhofa poemo, kaj havis anoncojn pri kiel oni povas aliĝi al esperantistaj organizoj.

Uzi la nomon de Morojo estis bona paŝo por rekoni niajn pionirinojn.

Pli da informo:

- **Profilo en la gazeto Racked**
<<https://bit.ly/30WPdWV>>
- **Guteto** <<https://bit.ly/30WPdWV>>
- Filmeto: **Myrtle R. Douglas: Mother of Convention Costuming** <<https://youtu.be/DasGQQkj-xY>>. Ĝi mencias ankaŭ *Forrie*, la unuan sciencfikcian kongreson, kaj Esperanton.

Piednotoj

1. Anglalingve, *cosplay* – hobbio, en kiu oni vestas sin per fantaziaj kostumoj dum kongresoj, ĉefe pri sciencfikcio aŭ populara kulturo.
2. Amatoraj gazetoj, kiujn produktas fanoj de specifa kultura fenomeno. (Angle: “Fanzines”)

Fiaskilo

senintenca esperantaĵo • Brandon SOWERS



Fiaskoj kutime alvenas tute seninvite. Sed por tiuj okazoj, en kiuj oni volas certigi fiaskon ... nu, jen la helpo.

Dankon al Brandon, kiu trovis tiun ĉi kafejon en Valencio, Hispanujo.

Kiel engluti manĝon sen maĉi zorgoplenajn pensojn?

traduku! • HOSS FIROOZANIA

La rubriko *traduku!* prezentas al vi diversajn tradukdefiojn. En paraj numeroj aperas tekstoj en Esperanto por enangligi; en neparaj, tekstoj en la angla por elangligi. Leginte viajn respondojn, ni prezentos resumon de la diversaj proponoj kune kun niaj reagoj kaj komentoj.

En tiu ĉi numero ni revenas al la fragmento el *La domenisto*, novelo de Paulo Sérgio VIANA. Por mi, lia simpla lingvaĵo kaj flua stilo donas impreson iusence travideblan: la parolturnoj kaj vortelektaj ŝajnas tiel naturaj, ke ili ne altiras mian atenton, kaj tiel permesas kvazaŭ senperan ĝuon de la intrigo.

Estas tre defie redoni tian sperton tradukante. Se oni redonas frazojn tro laŭvorte, ili akiras nenaturan guston. Denaskaj parolantoj rapide rimarkas tian traduklingvaĵon, kiu kutime impresas al ili tre negative.

En iaj tekstoj, ekzemple filozofiaj aŭ fakaj, la precizaj signifoj de la vortoj ludas kernan rolon, kaj oni devas rezigni pri natureco por reteni la esencon de la originalo. Sed pri pli “ordinaraj” rakontoj, tradukantoj foje sentas sin pli liberaj redoni fluan lingvaĵon, eĉ se ĝi ne restas laŭvorte fidela. Laŭ konsilo ofte ripetita, la tradukanto demandu al si: “Kiel la verkinto dirus tion, se li estus originale verkinta en la cello?”

Iuj tradukistoj eĉ konsilas, ke ni spicu niajn tradukojn el Esperanto por kompensi la rektan kaj simplan esprimmanieron de la lingvo, ĉar alie la rezultoj povas impresi iom senguste. Ekzemple, rimarkinte la relativan mankon de sociaj tavoloj kaj idiomaĵoj en Esperanto, István ERTL kuraĝigas al ni vorte riĉigi la originalon, redonante tekston nacilingve vivecan:

[E]sperantigi estas igi tekston pli suka ol seka, riĉigi, kaj disversigi kaj distavoligi. Oni frizu la

originalon, ĉar – kvankam en familia rondo ĝi ŝajnas tute malhirta – al fremdaj okuloj ĝi povus aperi nekombita. [En etnolingva] traduko de Esperanta frazo ekzamenanto trovus nenian eraron, tamen ĝi ŝajnas senviva, ĉar tro fidela.

[El “Traduko el kaj en esperanto(n)”, *Fonto* 135, Marto, 1992]

Responde al la ĉi-foja defio, ok tradukintoj brave sendis siajn anglalingvajn proponojn. Mi kore dankas kaj gratulas al BA, BS, DH, GK, JT, MC, RK, kaj SD. Kia bona rikolto!

Rimarkindaj vortoj kaj frazoj

- ***Mi bone memoras, kiam mi envenis tiun kafejon la unuan fojon, antaŭ kelkaj monatoj***

Pluraj tradukis pli-malpli laŭvorte, donante ekzemple: *I remember well when I came into the cafe the first time, a few months ago*. Tia solvo certe peras la signifon, sed al mi ĝi sonas iom peze en la angla pro ĝia longeco.

Kelkaj provis koncizigi; la plej konciza solvo venis de SD: *I well remember when I first entered that cafe*. Ĉu gravas konservi, ke la evento okazis *antaŭ kelkaj monatoj*? Eble ne. Dependas de tio, ĉu la longeco de la tempopaso havas rolon pli poste en la rakonto.

- ***mi vidis Fernandon sidanta ĉe fenestro, en la fundo de la ĉambro***

En la angla estus vere strange diri, ke iu sidas *in the bottom of the room*. *Deep in the room* ne impresas pli bone. Tial pluraj elektis pli naturan esprimon: *at the end of the room; at the far side; in the back*.

- ***Lia kalva, ronda kapo brilis sub la lumo de la mateno***

Preskaŭ ĉiuj provis redoni la frazon tre fidele, ekzemple: *his round, bald head shone under the morning light*, kaj simile. Tute en ordo, sed ĉu



La bitlibro *Dek du rakontoj* estas **libere elŝutebla**

<<https://esperanto-ondo.ru/Libroj/Libroj.php>>.

eblas vortigi ĝin iom pli anglece? Ĉu ekzemple, *The morning sun glinted off his bald dome*?

- *lia longa, **pendanta** nazo ŝajnis al mi iom komika*

Kelkaj fidele priskribis la nazon per *hanging*, tamen tio bildigas al mi nazon libere svingantan. Aliaj redonis *sagging*; *jutting*; *droopy*; kaj *drooping*. DH proponis la amuzan *honker of a nose*.

- *Li aspektis kiel iu, kiu atendas aliulon.*

Laŭvorta traduko povas krei malglatan sonripeton, ekzemple: *someone waiting for someone else*. Do kelkaj revortumis kaj simpligis, ekzemple: *He appeared to be waiting for someone*.

- *Li kun **mieno de kontenteco** rigardis al mi*

Pluraj redonis *a contented/placid expression*. DH iom revortigis: *He looked at me like he was pleased to see me*. Ĉiuj en ordo. Plej plaĉas al mi la elekto de SD: *He looked at me with an air of contentment*.

- *kvankam troviĝis pluraj tabloj liberaj, **li laŭte invitis min***

Multaj redonis *loudly invited me* aŭ simile, sed enangligante, mi emus iom klarigi, ke la laŭteco rilatas ne al la liberaj tabloj, sed al la distanco. Ekzemple: *he called to me from across the room* (MC).

- *Amiko, bonvolu sidiĝi ĉe mi!*

Ĉu en realisma dialogo anglalingvano vere dirus *Friend, please sit with me?* Eble. Sed plaĉas al mi ankaŭ la pli slangaj solvoj, ekzemple: *Say, buddy ...* (BS) kaj *join me!* (MC, DH).

- *Dum momento, mi timis, ke mi ne memoras pri **de longa tempo ne vidata konato***

Inter la proponoj estis: *an acquaintance I hadn't seen in a long time*; *someone I didn't remember from ages ago*; *someone I knew and had not seen for a long time*. Pli konciza estis: *someone I knew from long ago* (BA), kaj plej konciza estis: *an old friend* (MC), tamen tiu solvo eble tro ŝanĝas la

signifon de *konato*. (Aliflanke, la maljunulo ĵus nomis la rakontiston *amiko!*)

Kion vi pensas pri *an old acquaintance*?

- *mi rapide serĉis [lin] en mia memoro*

Pluraj redonis *quickly searched in/consulted my memory*, sed laŭ mia orelo, pli plaĉas *wracked my brain* (MC). Alia eblo: *struggled to recall his face*.

- *eble estus oportune **ne engluti mian matenmanĝon maĉante miajn zorgoplenajn pensojn, tute sola***

Interesa metaforo, ne facile redonebla. Kelkaj provis fidele konservi ĝin, proponante ekzemple: *it would be better than eating breakfast while chewing on my worried thoughts*, aŭ simile. La kunmeto de *engluti* kaj *maĉante* en la originalo estas sprita, tamen la metaforo sonas iom strange en la angla.

Anstataŭ *eating*, kelkaj redonis *devour* aŭ *wolf down*. Ĉu *engluti* nepre implicas voradon? Eble oni povus pravigi tian “frizadon” per la konsiloj de Ertl, sed laŭ mi, ĝi eble tro streĉas la originalan signifon.

Laŭ mia gusto, plaĉas la simpla: *better than me eating breakfast alone, thinking about my own worries* (BA) kaj ... *meditating on my worried thoughts all alone* (SD).

- *Bonan. Mia nomo estas Fernando.*

Jen neformala respondo al la saluto: *Bonan matenon. Bela vetero, ĉu?* Kompreneble, ne sufiĉus la laŭvorta *Good!* Kelkaj elektis la pli anglecan saluton *Morning*, kaj aliaj ŝanĝis la respondon al *Yes, it is* kaj *Hello*.

- *mi ne ĝenos vin **per teda interparolo kun stulta maljunulo***

Tiel Fernando modeste malestimigas sin por agi ĝentile. Sed en la angla, la fidela *tedious conversation with a silly old man* ŝajnas iom peze multvorta, ĉu? Kelkaj proponis esprimojn pli idiomajn, ekzemple: *rambling of an old fool* (BA); *tedious chit chat with an stupid old man* (GK); *old man talk* (BS); *stupid babblings of an old man*

(MC); kaj *small talk with a dumb old man* (JT).

Mi aparte ŝatis la sprite aliteracian *silly senior* de SD.

La sinteza traduko

Jen la kutima provo sintezi la diversajn proponojn en unu koheran tekston. Mi elektis nur laŭ la propra gusto, do kiel ĉiam ĝi estas arbitra solvo, neniel definitiva. Aldone mi iom “spicis” la dialogon kaj parolturnojn (foje simpligante ilin) por havigi espereble pli anglalingve naturan rezulton.

I clearly remember my first visit to that cafe several months ago. Looking for a seat, I spotted Fernando sitting by a window at the far end of the room. His bald dome glistened in the morning sun, and his long, drooping nose seemed almost comical. He seemed to be expecting someone. On the table before him were a tiny cup of coffee and a small box made of blue plastic. He gazed up at me with an air of contentment, and although there were plenty of tables free, he invited me to sit with him:

“Greetings, friend!” he called out. “Come, join me.”

I struggled to place him, fearing that I’d forgotten an old acquaintance. But after a moment I was sure: I had never met this old man with the long nose and the droopy ears. Still, his invitation sounded irresistible. And if he could make

interesting conversation, that might be preferable to a breakfast all alone with my worries. So I took a chance: After placing my order, I went over and sat across from the stranger.

“Good morning,” I said. “Nice weather we’re having.”

“Morning. The name’s Fernando. Look, friend, I won’t waste your time with an old fool’s small talk. I may be 81, but I still remember how boring old people can be. No, I invited you here for a small favor. Would you be kind enough to play a round of dominoes with me? Just one? It’ll take only a few minutes, really. I won’t make a peep, and you’ll be able to enjoy your breakfast in peace.”

“That’s a tempting offer. Do you often invite strangers to play dominoes?”

“Oh yes, but few accept the invitation. Everybody’s in such a hurry! But if you’re up for it, I’d be grateful.”

“All right, then. Let’s play a round.”

Por tiuj, kiuj volas vidi la diversajn proponojn kaj kompari ilin detale, en la reta versio de la artikolo vi trovos ĉiujn en paralela prezento.

La tradukdefioj denove paŭzas ĝis almenaŭ la fino de la jaro. Dankon al ĉiuj partoprenintoj pro iliaj spritaj kontribuoj en 2023! Ĝis venontjare!

La vivo de Peĉjo

ŝercoj • Timothy BORONCZYK



Mikronoveloj

Por nia mikronovelo-rubriko ni petas rakontojn de precize 100 vortoj – nek pli, nek malpli. Sendu viajn centvortaĵojn al la redakcio (trovu la adreson en la kolofono), kaj eble ili aperos en venonta numero!

La akvo nokte

Antaŭ jaroj mi laboris sur insulo atingebla nur prame.

Oni avertis min neniam transveturi nokte, ĉar malbonaĵoj okazas nokte surakve. Mi ne dubis: malbonaĵoj okazas nokte ankaŭ surtere, ĉu ne?



Tamen mi unufoje devis enboatiĝi vespere. Kio okazis? Mi renkontis dolĉe parolantan belulon! Sekvis dek monatoj da amindumado, dudek jaroj da edziĝo, du infanoj, kaj – laŭ mia scio – tri amantinoj.


Ĉi-nokte ni estas en malsama boato sur malsama lago. Tio povus esti romantika, sed ni ne ĉi-tieas por reveki la amon, kaj li ne plu parolas same dolĉe.

Konfesinde, tute neblas paroli en lia stato. Malbonaĵoj ja okazas nokte surakve.

— Debra HAMEL <hamel.debra@gmail.com>

Vivi hundan vivon

Dum Paska lundo, geedzoj piediris kun hundo en arbaro. Subite, grandega hundo aperis antaŭ ilia triopo, grincigante siajn dentojn. La teruro estis granda, ĉar la du hundoj komencis batali kaj la hundo de la geedzoj estis vundita.



Ili rapide serĉis helpon por sia kvarpieda amiko, kiu havis videblajn mordajn vundojn. La alia hundo malaperis. Viro, kiu vidis la batalon, proponis helpi, enaŭtigis kaj ekveturis ilin al la bestkuracisto. La kajuto estis parfumita per kanabo, sed ili fine atingis la bestkuraciston, kiu sukcesis savi la hundon.

La viro eliris sen scii, ke liaj pasaĝeroj estis juĝistino,

komisaro kaj ilia kontraŭdroga hundo.

— Paolo OMODEI-ZORINI <omodei@me.com>

Miopeco

Li piediras al la parko laŭ sia ĉiutaga vojo, tiel konata al li kiel lia apartamento: maĝummakulita trotuaro kaj ungo-salono, murskribaĵoj, fermita teatro kaj plenplenaj rubuoj. Alveninte, li surbenkiĝas kaj malfaldas gazeton. Kiam li demetas siajn okulvitrojn por legi, la surpaĝaj literoj tuj pliklariĝas. Pretere, la mondo fandiĝas en flikaĵon de multkoloraj formoj malprecize konturigitaj: kiel nuboj, ili povus esti io ajn, kion oni imagas.



Post horo, refaldinte la gazeton, li ekiras hejmen: makulita trotuaro kaj superfluantaj rubuoj kaj fermita ...

Subite li haltas, frapite de ideo. Li demetas siajn okulvitrojn, kaj la mondo fariĝas flikaĵo de koloroj. Ridetante, li plupromenas.

— Debra HAMEL <hamel.debra@gmail.com>

Kion mi diru?

“Kion mi diru?” mi pensis. “Ĉu eĉ gravas?” Mi ne vidis ŝin dum longa tempo.



Nia lasta konversacio aĉis, sed indas viziti ŝin. Endas pardonpeti. “Ĉu mi komence babilu pri banalaj ĉiutagaĵoj? Ĉu mi sciigu ŝin pri novaĵoj?”

Ve. Mankas plano.

Survoje, mi laŭtparolante ekzercis min. “Kara, vi mankegas al mi, kaj ...” Ne. Tro forta komenco. “Vi ja diris, ke vi ne plu volas paroli al mi, sed ...” Ne. Tro negativa. Eble ŝercu?

“Ne tiom zorgu. Parolu elkore,” mi pensis. “Tiel ni

ekkonatiĝis ... amikiĝis ... enamiĝis.”

Sed kiam mi alvenis, mi nur ekploris kaj genuiĝis legante ŝian tomboŝtonon. Mi diris nenion.

— Vince ALLISON <vinceallison@gmail.com>

Alia vidpunkto

“Ĉu mi povas helpi vin?”

“Espereble,” la viro diras. Li portas melon-ĉapelon kaj parolas fremdakĉente. “Vi estas la kvina okulisto, kiun mi vizitas. Mi bezonas okulvitron.”



“Mi certe helpos!” la okulisto diras. “Niaj kadroj

troviĝas laŭlonge de la muro. Pri kia vi interesiĝas?”

La viro ekrigardas la kadrojn kaj ĝemas. “Ne okulvitrojn,” li diras. “Okulvitron. Mi bezonas monoklon.”

“Malofta peto nuntempe! Homoj bezonantaj korekton unuokule kutime portas okulvitrojn kun nur unu korekta lenso.”

“Tio ne funkcios,” la viro diras.

“Ĉu via dekstra okulo?” la okulisto demandas, ne volante perdi klienton. “Maldekstra?”

“Nek,” la viro diras. Kaj li demetas sian ĉapelon.

— Debra HAMEL <hamel.debra@gmail.com>

All about *-um*

language corner • Lee MILLER

-um is a “non-precise” suffix that broadens or gives a different meaning to the root. Generally, you have to learn each *um*-construction as a separate word. And while some new *um*-words are occasionally created (like *retumi*, “to browse the internet”), it’s not really an actively productive suffix to the same degree that others are.

However, some *um*-words fit into categories. For example, some of them name articles of clothing:

- *kalkanumo* = heel (of a shoe)
- *kolumo* = collar (of a garment)
- *nazumo* = pince-nez (old-fashioned eyeglasses)
- *plandumo* = sole (of a shoe)

Some indicate actions done using a thing:

- *akvumi* = to water, to irrigate
- *aerumi* = to air out
- *literumi* = to spell using letters
- *sapumi* = to soap up

Some indicate actions involving a thing:

- *foliumi* = to leaf through (a book, etc.)
- *brakumi* = to hug
- *okulumi* = to make eyes at, to ogle

Lots of *um*-words, however, don’t fit in a category. Like *laktumo* (“milk,” based on *lakto* because of the milky appearance) and *cerbumi* (“to wrack one’s brain”).

PMEG (*Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*) has a fairly complete **listing of *um*-words in current use** <<https://bertilow.com/pmeg/vortfarado/afiksoj/sufiksoj/um.html>>.



Lee MILLER

Liĉjo is a member of the *Akademio de Esperanto*, an expert Esperanto instructor, and he has administered the *Duolingo Esperanto Learners* Facebook group since its inception in 2015.

<licxjo@gmail.com>